

Limburga Tago: sabato la 25-a de majo 2019

12:00 - 17:00

Kunveno de la Limburga Esperanto-Asocio

La fama **LIMBURGA TAGO** denove okazos!

Tia tago estis iam vaste populara kun centoj da vizitantoj. Eble vi iam partoprenis kaj ankoraŭ memoras. Nun ni, LEA, revivigas tiun tagon. Ĝi okazos jam la 25 de Majo 2019 en Zutendaal, la kreskiĝo-loko de Ben Indestege. Ni kunvenos je la 12:00-a horo en la parkejo de Kattevennen per pikniko. Poste ni faros promenon tra la belega limburga naturo, la arbaro de Kattevennia, la marĉlago de la katoj. Ni finos la promenon samloke antaŭ la 17-a horo. Tiuj kiuj volas, povas tiam manĝi kune (mempage) en la loka restoracio aŭ ie en Genk. La loko estas bone atingebla kun trajno kaj buso.

Adreso:

**Parkejo de Kattevennen.
Planetariumweg 18 - 19
3600 Genk, Belgio**

La pikniko kun promeno kostas 5 eŭrojn. Bonvolu anonci vin ĉe: limburg@esperanto.be Ĉiuj bonvenas! Ankaŭ familianoj kaj amikoj!

<https://www.kattevennen.be>

<https://www.nationaalparkhogekempen.be/nl>

<https://nl.wikipedia.org/wiki/Kattevennen>

27 mei 2019

Bonan novaĝon: La Limburga Tago denove vivas !

Je tagmeze ni renkontiĝis en Genk, ĉe Kattevennen.

Venis ne nur esperantistoj de nia klubo LEA, sed ankaŭ familianoj (de Ben) kaj 4 personoj el Antverpeno.

Ni manĝis la piknikon, preparitan de Ben kaj ekiris por la promeno.

Ni sekvis vojon tra arbaro kaj kamparo, kaj finfine venis en vilaĝo, kie ni vizitis la kavernon de Lourdes.

Tie oni kantis majajn kantojn (estis ankoraŭ majo). Ĉefe Niki konis la tekstojn parkere.

Post pluan promenado, ni denove ripozis sur benko en la arbaro.

La hundo Jesse ne ĉesis alporti bastonon, kiun ni devis forjeti.

Kiam ni revenis al la deirpunkto, atendis nin esperantisto el la najbareco, bone konata de la plej maljunaj esperantistoj: Albert Claesen.

Ni kune manĝis en proksima restoracio, kaj tie restis longe babilante kaj ĝuante la belan tagon.

Ni dankas ĉiujn kiuj partoprenis. Estis agrablan tagon, kun belan veteron.

La membroj de LEA jam havas planojn por la venonta jaro. La Limburga tago denove vivas !